# Amasa distanca instruado en Afriko per Vacapo

*Disvastigo de Esperanto pere de distanca instruado per WhatsApp*

## 1. Enkonduko kaj Kunteksto

### Inspira projekto celanta universitatan instruadon de Esperanto:

Esperanto, lingvo naskita el la revo pri tutmonda paco kaj reciproka kompreno, estas esence pli ol vortoj: ĝi estas simbolo de egaleco kaj kulturo. En mondo ĉiam pli interkonektita kaj defia, la bezono de lingvo, kiu forigas barierojn sen forviŝi diversecon, neniam estis pli urĝa. Esperanto permesas, ke ĉiu voĉo estu aŭdata.

Ĉi tiu projekto havas la ambicion fari ĉi tiun lingvon alirebla al tutafrika publiko kun tre malsamaj instru-niveloj, kun emfazo pri studentoj. Ĝis subtenas la junularan enpovigon. Ĝi celas inspiri kaj esti adaptota laŭ la bezonoj kaj situacioj. Naskiĝinta en la sino de konga universitato, ĝi nun plivastiĝas al diversaj publikoj kaj al la ceteraj afrikaj landoj.

### Pravigo de la projekto:

En la nuna internacia kunteksto, kie multaj estas devigataj adaptiĝi al lingvoj kun hegemonia influo, Esperanto brilas kiel justa alternativo. Male al la eks-koloniaj lingvoj, ĝi estas neŭtrala kaj facile lernebla.

La projekto emfazas teknologian uzon por igi la lernadon alirebla kaj efika. Uzante popularan komunikan kanalon kiel Vacapo (Whatsapp), ĝi ebligas al la  junuloj rapide akiri scion pri Esperanto, plifortigante ilian motivadon kaj sukceson.

### Inspiraj Celoj

- **Lingva Justeco:** Malfermi pordon al nova maniero komuniki, kie ĉiuj lingvoj valoras egale.
- **Junulara Povigo:** Ekipi junulojn per ilo, kiu faciligas interkulturajn interŝanĝojn kaj tutmondajn ŝancojn.
- **Afriko Kiel Lingva Pioniro:** Demonstri kiel Afriko, per sia diverseco, povas ludi kernan rolon en la antaŭenigo de Esperanto kiel kleriga ilo.

Ĉi tiu projekto estas en la spirito de Esperanto, apriora lingvo: Ni kreu pli ligitan kaj harmonian mondon, utiligante la jam uzatajn lokajn komunikilojn.

## 2. Priskribo de la Universitata Projekto

### Programo kaj ĉefaj agadoj:

1. **Strukturita Kurso pri Esperanto**
   - La kurso enhavas **100 lecionojn**. Ĉiu leciono enhavas mallongan skriban taskon.

- Ĉiun serion de 10 gramatikaj lecionoj sekvas **dialogo** kun mankantaj vortoj. Tio estas voĉa tasko.
- Ĉiu nivelo estas konfirmata per **10 testoj**, post ĉiu ŝtupo ĝis la nivelo B2.
- Subteno estas disponigita per Vacapo-grupoj:
  - **La Instruista Grupo** por instruistaj konsiloj kaj interŝanĝoj.
  - **La Fakaj Grupoj** por studentoj kun specialaj bezonoj.

2. **Parolaj kaj Skribaj Ekzamenoj**
   - La skribaj taskoj kaj testoj okazas ankaŭ en Vacapo.
   - La parolaj dialogoj same estas en Vacapo.
   - La parolekzamenoj okazas per Zomo (Zoom) antaŭ internacia ĵurio.

3. **Kultura kaj Socia Komunikado**
   - Tri grandaj sociaj grupoj kun entute **450 membroj** ebligas informadon pri la lingvo kaj la movado, plifortigante la uzadon de Esperanto en veraj soci-komunikaj situacioj.

4. **Subteno de la instruistoj-volontuloj**
   - Mi celas provizi la instruistojn de mia teamo per **klaraj gvidlinioj** kaj metodikaj rekomendoj.
   - Estas grave, ke ili akiru profundan scion pri la uzo de Vacapo, pri la mesaĝoj, la serĉilo (lupeo), la eblo pretigi mesaĝojn kaj dokumentojn, kaj la mastrumado de grupoj.
   - La sistemo devas esti konstante plibonigata por adaptiĝi al la kreskanta nombro da studentoj kaj virtualaj klasoj. Sekve, la instruistoj ankaŭ devas daŭre lerni kaj **adaptiĝi al la ŝanĝoj** en la protokolo, ekzemple por la transloko de studentoj al pli altaj niveloj post sukcesa plenumo de testo.

## Retaj komunikiloj trafaj por la uzantoj:

**Vacapo (WhatsApp) kiel Daŭripova Platformo**

- Uzante popularan platformon, la projekto evitas financajn investojn kaj teĥnikajn instalaĵojn (granda ekrano, kursigilo por vifio).
- Vacapo estas koncepto adaptita al la **afrikaj realaĵoj** kaj infrastrukturo. Ĝi funkcias eĉ per malstabila konekto.
- Vacapo ebligas **flekseblan** instruadon, sendante mesaĝojn kaj ricevante respondojn je malsamaj tempoj. Elektraj paneoj ne interrompas la kurson.

**Adaptiĝo kaj Inkluziveco**

- Eĉ lernantoj kun malregulaj horaroj kaj malmultaj monrimedoj por aĉeti datumojn povas sekvi nian kurson.
- Vacapo ebligas krei **kvizojn** ene de grupoj, tio helpas al la instruistoj agordi la enhavon al la bezonoj de lernantoj.
- Mi mem provizas **individuan instruadon** al la kelkaj lernantoj kun handikapoj kaj specialaj bezonoj. Tio ja estis mia profesio.

**Zomo (Zoom) por Videaj Ekzamenoj**

Por certigi la identigon de ekzamenatoj, la ĵurio uzas Zomon por la parolaj ekzamenoj. Se iuj studentoj ne povas utiligi Zomon, la ekrano de Vacapo estas uzata per telefono, kiun montras la kamerao de mia komputilo, tiel ke ĉiuj povas vidi la vizaĝon de la studento.

### Rezultoj kaj Perspektivoj

En decembro 2024, la projekto atingis:

- **165 registritajn gestudentojn** en la formala kurso.
- **450 aktivajn gelernantojn** en la sociaj grupoj.

Ĉi tiu projekto ne nur instruas lingvon, sed ankaŭ kreas komunumon, kiu mem kreskas. Ĝi estas modelo de inkluziva edukado, kiu povus esti etendata al aliaj regionoj kun similaj defioj.

## 3. Celoj kaj Atendataj Rezultoj

### Pedagogiaj, sociaj kaj kulturaj celoj:

**1. Pedagogiaj Celoj**

**Kapabligi Efikajn Uzantojn de Esperanto.**
La projekto celas krei kompetentajn lingvouzantojn, kiuj povas apliki Esperanton en skribaj kaj parolaj kuntekstoj.

- La emfazo estas sur **skribaj kapabloj**, ĉar multaj gestudentoj havas limigitan sperton pri tio, eĉ en la franca, kiu estas la instrulingvo en pluraj afrikaj landoj.
- **Kapabligi instruistojn** en efika mastrumado de Vacapo-grupoj. Plibonigi ilian Esperantan fluecon en profesia kunteksto kaj kapablojn pri distanca instruado.

**2. Sociaj Celoj**

**Krei Viglajn Komunumojn.**
Fari Esperanton ne nur lingvo, sed ponto al socia konekto:

- Fondi grupojn en Vacapo por diversaj **urboj** en Kongolando, kio helpas izolitajn lernantojn trovi lokajn esperantistojn.
- Enigi la gelernantojn en pli grandajn, internaciajn grupojn, kiuj fokusas diversajn **temojn** kaj interesojn (Virina Grupo, Esperanto kaj Scienco, ktp).
- Doni al la partoprenantoj senton de aparteno al pli vasta tutmonda komunumo (danke al la vacapa **komunumo** nomata **Esperanto**).

**3. Kulturaj Celoj**

**Promocii Lingvan kaj Kulturan Diversecon**
Esperanto fariĝas ilo por malkovri kaj aprezi la multkolorecon de la homaro.

- Subteni la ideon de mondcivitaneco, per kiu afrikaj studentoj sentas sin parto de la homaro, malgraŭ la ne sufiĉa reprezentado de iliaj landoj en internaciaj amaskomunikiloj.
- Enkorpigi Esperanton kiel rimedon por interligi malsamajn kulturojn, religiojn, kaj tradiciojn.

### Atendataj rezultoj sur la mallonga kaj longa tempo:

**Proksimaj Rezultoj**

1. **Lingvaj Atestiloj kaj Komunikaj Kapabloj**
    - Parto de la partoprenantoj akiros atestilojn de ILEI.
    - La Fakultato pri Lingvoj, Esperanto kaj Interlingvistiko provizos la eblon al studentoj akiri diplomojn de UEC (Universitato Espero de Kongolando).
    - Lernantoj regos skribajn regulojn, kio estos utila por oficialaj taskoj, ekz. redaktado de raportoj aŭ projektoj.
2. **Lerta Instruistaro**
    - Formado de grupestroj kaj instruistoj, kiuj povas sukcese gvidi similajn projektojn en siaj regionoj.

**Longdaŭraj Rezultoj**

1. **Vastigo de la Esperanto-Komunumo**
    - Signifa kresko de la Esperanto-parolantoj en Afriko, kun pliiĝonta nombro da lokaj kaj internaciaj grupoj, instigitaj ankaŭ de la efikoj de la lasta UK (Universala Kongreso) en Tanzanio.
2. **Ambasadoroj de Esperanto**
    - Kapabligo de gvidantoj, kiuj povos ne nur instrui Esperanton, sed ankaŭ organizi kaj en siaj lokaj komunumoj kaj en internaciaj kuntekstoj.

# 4. Metodologio kaj Realigo

**Paŝo 1: Rekrutigo de Studentoj**

- **Neformala Diskonigo:** Rekrutigo okazas per la rekomendoj de antaŭaj studentoj kaj esperantistoj en Afriko. Necesas adaptiĝi al la kreskanta nombro da lernantoj, rekrutigante kaj trejnante pli da help-instruistoj.
- **Adaptado de la Klas-grupoj kaj de la Protokolo:** La mastrumado de klasoj kaj raportado pri progresoj estas senĉese perfektigata por plikreskigi la memstarecon de la instruistoj.

**Paŝo 2: Enskribiĝo kaj Pedagogia Metodo**

- **Persona Individua Akcepto:** Ĉiu studento estas registrata en UEC kaj bonvenigata en la granda socia grupo "Afriko 1" kaj en la klas-grupo dediĉita al la komencanta alfabeta nivelo.
- **Strukturitaj Lernaj Stadioj:** La kurso konsistas el 100 lecionoj dividitaj en serioj de 10. Ĉiu lernas laŭ sia propra ritmo kaj ĉiu grupo ne superas 10 membrojn.
    - **Lecionoj:** Inkluzivas franclingvajn klarigojn kaj tradukendan frazon. La instruistoj ne donas respondojn sed indikojn. La studento korektu sin mem.
    - **Dialogoj:** ili estas grava voĉa ekzerco por konversacia praktiko.
    - **Testoj:** Oni ilin trapasas en du etapoj. Ĉar la unua provo montras la numerojn de lecionoj, kiujn oni devas relerni. Post repaso de la samnumeraj lecionoj, eblas provi duan fojon la 10 demandojn de la testo kaj ricevi noton.

**Paŝo 3: Subteno al Studentoj kun Specialaj Bezonoj**

- **Fleksebla Ritmo:** Normale, a studentoj kompletigas unu lecionon ĉiun duan tagon. Ĉi tiu ritmo ebligas trapasi ĉiujn 100 lecionojn en dek monatoj. Tio signifas finsolvi 3 lecionojn semajne, kaj ne resti pli ol unu monaton en ĉiu virtuala klaso.
- **Individua Subteno:** Studentoj kun specifaj malfacilaĵoj ricevas specialan atenton. Ekzemple:
    - **Lern-malfacilaĵoj:** Subteno de tiuj kun kognaj aŭ karakteraj defioj.
    - **Blindulo:** Voĉlegado de ĉiuj lecionoj kaj testoj.
- **Administrado:** Du tabeloj en Google Sheets (pri klasoj kaj studentoj) estas uzataj por spuri progreson, rapidecon kaj personajn informojn en realtempa maniero.

**Paŝo 4: Taksado kaj Ekzameniĝo**

- **Skribaj Testoj:** La instruistoj.
- **Parolaj Ekzamenoj:** La ekstera internacia ĵurio de ILEI (Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj).
- **Diplomoj:** Senpaga atestilo de ILEI, kun mencio pri la nivelo, kaj pagenda universitata diplomo de UEC.
- **Daŭriga Kurso:** Progresa kurso pri afrika kulturo. Nivelo B2.

## Partopreniga Aliro kaj Kunlaboro

- **Grupaj alvokoj:** Semajnfinaj grupaj alvokoj ebligas voĉan praktikon kaj subtenon.
- **Help-instruistoj:** Post diplomiĝo, studentoj estas instigataj iĝi help-instruistoj, utiligante siajn spertojn pri nia sistemo por subteni novajn lernantojn. **Ĉi tiu modelo certigas daŭripovan kreskon de la programo.**

  Jen kelkaj mesaĝoj de tiuj freŝaj instruistoj:

  *H…: "Mi "dankas vin pro la ŝanco, kiun mi ricevis kunlabori ĉar mi multon lernas de vi.*

  *Mi neniam instruis tra la reto, ekzemple per WhatsApp, neniam, sed mi dankas vin pro enmeti min kiel kunlaboranton por instrui Esperanton al aliaj uzante tiun platformon.*
  *Vi estas sperta instruistino, kiu faras ĉion eblan por plibonigi la laboron."*

  *L…: Dankon pro tiuj klaraj klarigoj; uzante ilin kaj la aliajn, kiujn vi sciigis ĉe la grupo de instruistoj, mi administros mian klasgrupon.*

  *V…: Nun mi vidas min kiel vera instruisto ĉar mi ne plu bezonas vian vidpunkton por aprezi la nivelon de miaj gelernantoj. Sincerajn dankojn al vi pro tiu sendependiĝo mia.*

## Unika Valoro de la Metodo

- **Facila Alireblo:** La uzo de Vacapo certigas atingeblon el diversaj partoj de Afriko kaj eĉ por studentoj kun limigitaj rimedoj.
- **Adaptiĝemo:** La fleksebla kaj evoluanta sistemo respondas al individuaj kaj regionaj defioj.
- **Solidara Lerno-komunumo:** Tra vigla interŝanĝo kaj subtena sistemo, la projekto fortigas la senton de aparteno kaj la fratecon.

## Inspiraj Perspektivoj

Ĉiu studento, ĉiu help-instruisto, kaj ĉiu instruisto lernas ne nur lingvon sed justan socian kunvivadon.

Ĉi tiu projekto estas ne nur lingvokurso sed viva ekzemplo de la transformiga potenco de Esperanto kiel ilo por persona progreso kaj mem-evoluo.

# 5. Originaleco kaj Fareblo

## Originaleco de la projekto

La projekto estas unika pro sia integriĝo de simplaj teknologiaj iloj kun seriozaj pedagogiaj kaj sociaj principoj:

1. **Pionira Uzo de Teknologio:**

**Vacapo kiel Platformo:** La uzo de ĉiutaga ilo kiel WhatsApp ("Vacapo") por plene strukturita instrua programo estas revolucia. La metodo transformas tiun ĉiutagan komunikilon en potenckapablan edukilon, superante la limojn de la  kutimaj izolitaj instru-grupoj. Niaj grupoj estas interkonektitaj kaj en la komunumo estas **kanalo**, per kiu mi dissendas al ĉiuj informojn pri la organizo.

**Ampleksigita Funkcio:** Trajtoj kiel voĉmesaĝoj, pliigita aŭskulto-rapideco, kaj integriĝo kun la apo Kõnele, plifaciligas la instruadon kaj ŝparas tempon. [Parol, la voĉroboto](), ebligas diktadon de mesaĝoj rekte en Esperanto.

2. **Komunum-Kreado:**

Lernantoj estas ne nur partoprenantoj en kurso sed membroj de pli larĝa, tutmonda Esperanta komunumo, ekde kiam ili eniras en sian unuan virtualan klason.

Per interago en diversaj eksteraj grupoj, ili praktikas Esperanton en reala, vigla kunteksto preter la virtualaj klasĉambroj.

3. **Kultura Aktivigo:**

Unu el la plej ĝojigaj aspektoj estas observi la kreskon de niaj lernantoj kiel veraj esperantistoj. Ĉiu fojo, kiam komencanto kuraĝe sendas al mi – ĉu poemon, kanton, novelon, aŭ skeĉon – tio estas signo de lia enradikiĝo en la Esperanta kulturo.

4. **Individua Sekvado kaj Subteno:**

Unika estas en tiu projekto la atento pri specialaj lern-bezonoj. Ĉiu studento kun malfacilaĵo ricevas personan helpon, se li aŭ ŝi esprimas tiun bezonon. Eĉ studentoj kun handikapoj, aŭ en severaj vivkondiĉoj (kiel rifuĝintoj) ricevas adaptatan instruadon.

## Fareblo

La projekto estas ekstreme farebla kaj adaptita al malsimilaj lokaj realaĵoj en Afriko:

1. **Facila Alireblo al Teknologio:**
   - **Poŝtelefonoj:** La elekto de Vacapo reflektas la realon, ke multaj homoj en Afriko havas pli facilan aliron al poŝtelefonoj ol al komputiloj.
   - **Datumoj:** La projekto postulas nur minimuman kvanton da interret-datumoj, kompare kun Zomo, farante ĝin finance atingebla eĉ al studentoj.
2. **Fleksebla Lernado:**
   - **Malsamtempa Metodo:** La programo permesas al ĉiuj lerni laŭ sia propra ritmo, sen la bezono esti samtempe konektita kun sia instruisto.
   - **Fiksa Strukturo:** La kurso estas dividita en klarajn seriojn (po 10 lecionoj), kio faciligas progresadon pro klare montrebla programo.
3. **Malaltaj Kostoj kaj Alta Efikeco:**
   - La projekto ne postulas multekostajn infrastrukturojn. Ĝi dependas de bone organizita kunlaboro.
4. **Reprodukteblo:**
   - Ĉar la kurso estas perreta, la modelo estas facile reproduktebla al pli granda nombro da publikoj kaj landoj.
   - Kun ĉiu nova generacio de lernantoj, help-instruistoj povas esti rekrutigataj, tiel kreante memsufiĉan instruan reton.

Resume

Ĉi tiu projekto estas ne nur lingvokurso sed ĉiam kreskanta sistemo. Pro la komuna metodo, pro la preciza organizo, pro la memstareco de la instruistoj kaj ilia interligo, kaj pro la rekrutigo de la finlernintoj, la sistemo pli kaj pli fortiĝas.

# 6. Efikoj kaj Takso de la Projekto

## Antaŭviditaj efikoj  de la projekto:

1. **Lingva kaj Eduka Progreso:**
    - **Disvastigo de Esperanto:** Pliigo de la nombro da parolantoj kaj novaj regionoj en Afriko, inklude la ĵus aldonitan landon Malavio.
    - **Kresko de UEC:** Rekono de Esperanto en la Universitato UEC (Université Espoir du Congo) inter oficistoj, asistantoj kaj profesoroj, el kiuj kelkaj jam lernas la lingvon.
2. **Sociaj kaj Profesiaj Evoluoj:**
    - **Kapabliga Procezo:** La help-instruistoj akiras sperton pri uzado de soci-retaj iloj kaj metodiko.
    - **Kultura Interŝanĝo:** La projekto funkcias kiel ilaro por tutmonda kunlaboro inter Esperantistoj, provizante metodon kaj instrumaterialon adaptotaj al alispecaj komunikiloj.
3. **Komunuma Efiko:**
    - **Plifortiĝo de la Lokaj Komunumoj:** Helpe de la vacapaj grupoj pri urboj, la regionaj grupoj, studentoj kaj aliaj esperantistoj renkontiĝas fizike kaj kunigas siajn fortojn.
    - **Nova Perspektivo:** La kuraĝigo de studentoj al krea esprimo kaj internacia partopreno (ekz. partopreno en kulturaj eventoj) plifortigas ilian konsciencon kiel  mondcivitanoj.
4. **Teĥnika Novigo:**
    - Instruistoj reuzas la instrumaterialojn kaj adaptas la uzon de socikomunikaj platformoj.

## Takso-metodoj

### Takso de la instruado:

- **Individua Progreso:**

La mastrumado de la individuaj progresoj uzas tabelon, kiuj montras la nombron da lecionoj, la nombron da testoj, la rapidecon de la lernado (kiom da semajnoj la studento restis en ĉiu klas-grupo).

- **Instrua Administrado:**

La mastrumado de la klas-grupoj uzas alian tabelon, kiu montras, ekz. kiuj niveloj bezonas, ke mi kreu plian virtualan klason.

### Takso de la projekto:

La sukces-indikiloj inkluzivas:

- **Kvantajn kriteriojn**

- La nombro da studentoj, kiuj sukcese kompletigas ĉiujn 100 lecionojn.
- La nombro da studentoj, kiuj prezentas sin al la parol-ekzamenoj.
- La nombro da partoprenintoj en la grupaj alvokoj.

- **Kvalitajn kriteriojn**

- La aktivaj personaj interagoj (sendo de voĉmesaĝoj, prilingvaj demandoj, peto de lernmaterialo, ktp.)
- La partopreno en fakaj grupoj.
- La ĉeesto de internaciaj eventoj.

# 7. Daŭripovo kaj Reproduktebleco

## Daŭripovo sur la longa tempo:

La projekto estas specife desegnita por certigi sian ne interrompecon kaj disvastigon tra kelkaj esencaj faktoroj:

1. **Lokaj Rimedoj kaj Facilaj Teknologioj:**
    - Ĝi utiligas alireblajn ilojn, kiel poŝtelefonojn kaj popularajn retplatformojn (ekz. Vacapo), kiuj estas jam vaste uzataj.
2. **Memstareco:**
    - La sistemo instigas studentojn transiri al pli altaj niveloj kaj eventuale fariĝi help-instruistoj. Ĉi tiu modelo kreas memdaŭrigeblan komunumon de volontuloj, kiuj povas kontribui al la projekto.
    - La Universitato UEC estas nia oficiala kadro, kiu subtenas la instituciigon de Esperanto en la kongolanda nacia eduk-sistemo.
3. **Minimuma Dependo de Ekstera Financado:**
    - La malaltaj funkciigo-kostoj ebligas pluvivon sen ekstera subvencio. Tamen, la projekto ankaŭ konsideras la gravecon financi la volontajn instruistojn por kovri iliajn retajn elspezojn.
4. **Flekseblo:**
    - La malsamtempa instruado permesas instruadon je individuaj ritmoj. En Afriko, la vivo ne estas stabila. Instruado devas akcepti tion.

## Reproduktebleco:

★ **Modelo Facile Adaptebla por Aliaj Lingvoj (kaj regionoj):**

La projekt-modelo estas facile adaptebla al aliaj geografiaj regionoj, ĉu aliaj afrikaj landoj aŭ ekster la kontinento, kie Vacapo popularas. La programo povas esti etendata per la efektivigo de vacapaj komunumoj (aroj da organizitaj vacapaj grupoj)  disponeblaj ankaŭ en **aliaj afrikaj lingvoj**. Ni jam lanĉis vacapajn grupojn de instruado de la svahila per Esperanto, de instruado de Esperanto per la svahila, per la angla kaj per la runda.

★ **Modelo Facile Adaptebla por Aliaj Apoj (programetoj):**

La projekt-modelo preterpasas Vacapon. Eblas reprodukti aŭ adapti tiun organizan modelon uzante la surlokan soci-retan programeton **plej popularan en la koncerna lando**:

- la tre fleksеblan apon **Line** (kun facila arĥivaj dosierujoj) en suda Azio (efektive, mi jam mallonge instruis Esperanton en Bangkoko kaj tiam ekuzis ĝin),
- **Telegramo**.org (kiu jam enhavas abundegon da Esperantaj grupoj kaj estas tre fleksebla),
- **VKontakt** (aparte voĉ-amika, taŭga por sonmaterialo) en Rusujo,
- **Kakaotalk** (en Koreujo),
- **Signal** (iom malpli fleksebla por amasa instruado),
- **Viber** (sudorienta Eŭropo, iam mi kreis Esperantan grupon en ĝi)
- eble **Reddit** (krei komunumojn *subreddits*)

- kaj **Discord** (voĉaj kaj video-vokoj, eblas realigi sesiojn kie la membroj ekzercas sin kune en reala tempo.)
- **WeChat** (en Ĉinujo, maltaŭga ĉar tuj blokiĝas pro amasa mesaĝado).

★ **Modelo Facile Adaptebla por Aliaj Kursoj:**

Por instrui distance uzante nur telefonon, la principo estas: diserigi kurson en malgrandajn partetojn taŭgajn por telefona formato, kaj igi la programon tiel klara kaj mezurebla, ke la uzanto (instruisto kaj studento) iras paŝo post paŝo laŭ fiksita gvidlinio.

Ni ĝuste nun komencas adapti Lernu (por nia anglalingva kurso). Granda revo: adapti la BEK-kurson por telefona instruado.

Resume:

La projekto estas ne nur daŭrigebla sed ankaŭ facile eksportebla al diversaj lokoj kaj lingvaj medioj. La modelo de memstara memplifortiĝanta komunuma strukturo certigas ĝian vivkapablon sur la longa daŭro, dum ĝia fleksebla modelo ebligas senfinajn adaptojn al novaj kuntekstoj.

## 8. Konkludo kaj Alvoko al Ago

### Konkludo

Ĉi tiu projekto estas pionira iniciato, kiu elstarigas la praktikan valoron de Esperanto kiel ilon por interkultura komunikado kaj eduka inkluziveco. Utiligante simplajn kaj alireblajn teknologiojn kiel Vacapon, ĝi pruvas, ke efika instruado kaj komunum-konstruado ne bezonas altajn kostojn aŭ kompleksajn rimedojn. Ĉiu paŝo de la metodo – de la individuigita instruado ĝis la instigo de lernantoj fariĝi help-instruistoj – refortigas la daŭripovon kaj disvastigeblon de la sistemo.

Krome, la projekto donas al la partoprenantoj multe pli ol lingvan lernadon: ĝi ofertas al ili membriĝon en viva internacia komunumo, kie idealoj de paco, egaleco, kaj kunlaboro transpasas landlimojn. Ĉi tiu modelo ne nur sukcese instruas Esperanton, sed ankaŭ montras, kiel lingvo povas esti ilo por socia ŝanĝiĝo kaj individua kresko.

### Alvoko al Ago

Ni alvokas ĉiujn, kiuj kredas je la potenco de lingvoj por kunigi homojn, subteni kaj disvastigi ĉi tiun projekton!